

EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 52. Septembro 8, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbello Koffi.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Sume: 430 KB

Temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipite koneblaj.

Amerika kuniĝo kun apogo de UEA

Brazila Esperanto-Ligo, kunlabore kun Brazila Esperantista Junulara Organizo, ĝia federita asocio Cearaa Esperanto-Asocio kaj la Amerika Komisiono de UEA, organizas la 10-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto (TAKE), kiu okazos de la 2-a ĝis la 5-a de novembro 2023 en Fortalezo, Brazilo.

Ĝis la 1-a de septembro 2023 amerikaj esperantistoj povis kandidatiĝi en la konkurso "Partoprenu TAKE-n!" por vojaĝ-subsidencio al la 10-a TAKE. Eblis skani la kodon sur la bildo aŭ aliri la ligilon <https://mallonge.net/take2023>. Apude jen aŭto pri la konkurso. UEA aldone invitas ĉiujn kun familianoj (re)kunveni en la bela urbo Fortalezo. La retpaĝo de la 10-a TAKE estas <https://esperanto.org.br/kongreso>. La temo de la kongreso estas "Homaj rajtoj, solidareco kaj memdetermino de popoloj". La evento plenos je aktivaĵoj, arto kaj agrabla etoso.

10-a TAKE
BKE BEJK CKE

Konkurso: Partoprenu TAKE-n 2023
de la 2-a ĝis la 5-a de novembro 2023

10-A TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO (TAKE)

UEA pere de sia Amerika Komisiono invitas vin konkursi.

SE VI LOĜAS EN AMERIKO KAJ VOLAS PARTOPRENI TAKE-N 2023 EN FORTALEZO, BRAZILO, SED BEZONAS MONSUBTENON, KANDIDATIĜU POR RICEVI MONHELPOJN PRI ALIGKOTIZO, LOĜADO, MANGADO AŬ EĈ VOJAĜKOSTOJ.

SEKVU LA LIGILON KAJ ALIĜU ĜIS LA 1-A DE SEPTEMBRO.

mallonge.net/take2023

uea

Ĉina retejo raportas pri la Kongreso de ILEI

La Ĉina Komunika Grupo raportas pri la kongreso de ILEI en Linjano Orsabla, Italio:

<https://esperanto.cri.cn/2023/08/29/ARTI8DrWOG2tNjCbwrSUQfnM230829.shtml>

Sendis: Alessandra Madella

Aliĝoj por la UK en Aruŝa

Je la 8-a de septembro UEA registris 116 personojn el 35 landoj. Elstaraj landoj estas Tanzanio (14), Germanio (12), Usono (7) kaj Brazilo (7), Italio (6), Francio (5) kaj Japanio (5).

La plej lasta stato de aliĝoj ĉiam spekteblas ĉe: <https://uk.esperanto.net/2024/>

Septembraj jubileoj

En septembro siajn naskiĝdatrevenojn festos **Paulo Sérgio Viana** (75 jaroj), **Probal Dasgupta** (70), **Jerzy Handzlik** (65) kaj **Josip Pleadin** (65). Gratulojn kaj bondezirojn! Legu la liston de la Esperantaj jubileoj kaj memordatoj en septembro 2023, kompilitan de la Ruslanda ĵurnalisto kaj histori-esploristo Aleksander Korĵenkov, en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" ĉe <https://sezonoj.ru/2023/09/septembro-11/>

Israelo pri la UK

Jen la nova duobla numero de Israela E-isto: <http://esperanto.org.il/dosieroj/IE174-175.pdf>.

En septembro okazis **hibrida kunveno** pri la UK en Torino, fizike en la klubejo en Alon-turo kaj virtuale en la kutima Zoom-adreso <https://huji.zoom.us/j/7508982919>. Eblas vidi la Kongresan Kurieron kaj la Kongresan Libron en <https://uea.org/pdf/uk2023/>. Estis bela kaj bone organizita kongreso, la unua post-pandemia UK en Eŭropo, kun pli ol 1300 partoprenatoj el 69 landoj, 6 el Israelo. Jen la Kongresa Kuriero kaj la Kongresa Libro, kiuj troviĝas en <https://uea.org/pdf/uk2023/>.

Fotoj de la kongreso videblas ĉe miaj FB-afiŝoj:

<https://www.facebook.com/media/set/?vanity=amri.wandel&set=a.10230918678580395>

<https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10230918294810801>

<https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10230902965547579>

<https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10230941317706359>

<https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10230935442799490>

Postkongresa ekskurso tra Italio (Milano, Aosta), Svisio (Lugano) kaj Francio (Mont Blanc):

<https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10230976179857891>

Amri Wandel

Kursoj franca kaj kostarika

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanto-kurso; Gvidantonomo: Camy Guy

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Oloron Sainte-Marie, Francio

Aldoninto: Vojo64

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27549>

Nomo: Universitato de Kostariko

Gvidantonomo: Jorge Antonio Leoni de León

Tipo: Nova universitata kurso

Loko: San Holse, Kostariko

Aldoninto: tiberido.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27550>

El la retkunsido de universitataj agantoj

- septembra sesio de la interlingvistikaj Kursoj en Poznano.
- nebona situacio de la magistras studoj en Poznano pro manko de aliĝoj.
- varbado pri la kurso por universitataj instruistoj en la universitato de Seviljo.
- komenco de la kurso pri Esperanto en la universitato de Kostariko.
- situacio de la Fakultato pri lingvoj de la universitato Espero en Kongo kaj kandidatiĝo de ties rektoro, Elisee Byelongo, al la konga parlamento.
- agado de Longarko en Ĉinio subtene al la kursoj en Poznano.
- situacio de la klubo Esperanto en la universitato de Giridhar Rao.
- simpozio pri sekureco de flugoj kaj fino de la kurso en la universitato de Teherano.

Raportis: Renato Corsetti

La 56-a ILEI-Kongreso kaj la 79a IJK laŭ Liba Gabalda

Ili okazis tuj post la Universala Kongreso en Torino. Al ILEI aliĝis 157 geesper-antistoj el 30 landoj kaj la IJK arigis 98 partoprenantojn el la tuta mondo. La kongresoj okazis en bela rezidejo 'Bella Italia' ĉe pinarbaro kun zumantaj cikadoj. Tie ni loĝis en pluraj domoj dise en la arbaro kaj la programeroj okazis en kvin malsamaj lokoj. La kongreso de ILEI estis hibrida, do aliaj esperantistoj povis profiti de kelkaj programeroj rete kaj samtempe eblis interveni aŭ prezenti siajn prelegojn. Okazis samtempaj programeroj kaj ni povis ĉeesti alterne iun ajn el ambaŭ kongresoj. La ĉefa temo estis: 'Intergeneracia kunlaboro pri edukado - instrui Esperanton en lernejoj'. Ĝi estis plene reprezentata en la komuna programo.

Inaŭgure bonvenigis nin Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni kaj Alessandra Madella. Nome de la junularo salutis la nuna prezidanto de TEJO Alberto Stalin Garrido kaj la venonta prezidanto Tyron Surmon. La ĉefparoladon prezentis la prezidanto de UEA Duncan Charters. Rete salutis la prezidanto de ILEI Ahmad Reza Mamduhi. Honoris nin la ĉeesto de la prezidanto de UEA, la sekretario Alex Kadar kaj la ĝenerala direktoro Martin Schafer. Post la inaŭguro ni komune fotiĝis. Okazis lingva festivalo, kursoj por komencantoj kaj por progresantoj, Eo-instruiloj en la bildkarta varbado, Trejnseminario 'Interkultura kompetento', Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la mondo, Frazologio, Lernolibroj de E-o, La vojo al perfektigo, Lerneja agado inter Francio, Slovenio kaj Rusio, Eo-instruado en ĉinaj lernejoj, Kutimoj, Tradicio kaj historio de Ukrainio, 60-jariĝo de la revuo Kontakto, La 30 oraj horoj, Eo-movado en Malagasio, Enkonduko al ĵurnalismo, Movadaj spertoj en Sudameriko, La projekto Verden en rilato kun instruado, Ludforma origamia ateliero, Origamio kiel arto kaj scienco, Karaokeo, Duolingo, Birda migrado en la Amerikoj, Tanzanio kaj la UK en 2024. Estis pluraj prelegoj kaj sciigoj pri Litovio kaj Ukrainio, Ĉernobil, Homaj rajtoj en Pakistano, Instruado de la kroata lingvo, Instrui lingvon al pliaĝuloj. Ekmalkovro de la lando per vojaĝo inter la dudek regionoj de Italio kaj per rigardo de iliaj kulturoj kaj tradicioj. Interesa estis la prelego pri 'Bonkvalita teo similas al belulino'; Okazis AMO (Aktivula Maturiĝo) seminario 102 kun titolo: 'Interkulturo en Lernejoj.'

Vesperaj programeroj konsistis el koncertoj de JoMo, Ĵomart kaj Nataŝa. Okazis kunvenoj de BEMI, Komitato de ILEI, Asembleo de Itala Instituto de E-o, Prelegoj pri famaj virinoj: Luisa Spagnoli, Antonietta Bernadoni, Verda Majo, Paola Masino, Tina Modotti, Maria Montessori, Flannery O'Connor, Marjorie Boulton, Marie Skłodowska-Curie, fratinoj Anna kaj Helene Michelau – du artistinoj el Orienta Pruslando, Danica Bedekoviĉ, Pobjedniĉka kaj Anatonija Joziĉ.

Koncizigo de raporto de Liba Gabalda

